

Theodor Storm,

## Lunlumo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ripozas jen la mondo  
En lumo de la lun';  
Kaj kia pac' beata  
ĝin ĉirkaŭtenas nun!

La vento nur susuras,  
Apenaŭ movas sin,  
En tiu milda brilo  
Ekdormas je la fin'.

Kaj kio ne ekfloris  
Dumtage sub la sun',  
Malfermas la kalikojn,  
Odoras nokte nun.

Al tiu pac' delonge  
Ne kutimiĝis mi!  
Amplena luno estu  
en mia vivo vi!

*Traduko de la Germana poemo "Mondlicht" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-494-965 (2009-11-07 19:37:14)*

*Mi, Manfred Retzlaff, esperantigis tiun chi poemon en la 13/14a de Aprilo de 2002.*